
# HEJS-JUNECO

Eldonas:
HISPANA ESPERANTO JUNULARA SEKCIO (de HEF)
C/ CARRERAS CANDI 34-36 BARCELONA -28-

N-ro 113
1.981



Estrara Kunveno okaze de la 5-a
HEJS-TENDARO en Elche (Alicante)

## AMUZA RENKONTIĜO DE LA ESPERANTISTA JUNULARO

De la 16-a ĝis la 19-a de Aprilo okazis la 5-a HEJS-TENDARO en Elche(Alicante), ĉeestis proksimume 60 personoj, kiuj venis el diversaj provincoj: La Coruña, Valladolid, La Rioja, Barcelono, Madrido, Valencio, eĉ Belgio, k.t.p..Nin akompanis ankaŭ kelkaj Elche-anoj, inter kiuj troviĝis S-ro Antonio Verdú(la organizanto de la tendaro) al kiu ni tre dankas pro lia helpo.La vetero estis relative malbona: pluvadis la unuaj tagoj, sed poste brilis la suno-ni eĉ havis okazon bani nin en la maro kaj bruniĝeti.La kampejo estis tre bela kaj komforta, plena da palmarboj-same kiel la urbo, kie oni troviĝas pli ol miliono da ili, plie la mastro pruntedonis al ni ĉambron por kunveni.

En Elche ni vizitis diversajn vidindaĵojn.Ni faris ekskurson al Santa Pola, apudmara vilaĝeto, kaj al la arkeologia muzeo "La Alcudia".

Ĉiu vespere samideano Juan Carlos Ruiz el Madrido gvidis elementan kaj superan kurson de Esperanto, miksante seriozecon kun spritaĵojn pro kio li tre amuzigis la klason.Nokte oni parolis, kantis kaj ludis gitaron, ĝis kiam la estro de la kampejo ordonis nin silenti.

La estraro de HEJS kunvenis.Nia redaktoro, Carlos Moya, demisiis, argumentante ke mankas tempo al li por tiu tasko.Oni ankaŭ decidis, ke la venontan jaron la tendaro okazos ĉu Logroño aŭ Cuenca, sed la esperantista grupo de tiuj urboj jam laboras por efectivigi ĝin.

Estas ankaŭ rimarkinde, ke ĵurnalisto intervjuis nin por informi pri la Esperanto-movado kaj nia tendaro.

Resume, la tendaro sukcesis; kaj ni esperas trovi multe da gejunuloj en la proksima 6-a HEJS-TENDARO.

HEJS-vicprezidantino
Ana Mª Ranero.

## RESOLUCIONES DE LA ASAMBLEA REALIZADA EN EL QUINTO H.E.J.S.-TENDARO

Domingo, 19 de'abril se efectuó la reunión de la junta de HEJS,presidida por el Presidente de HEJS y todos los demás miembros de la Junta.
Los temas que se trataron fueron los siguientes:

a) Se propusieron dos candidaturas para el lugar donde deberá celebrarse el próximo campamento de HEJS, tales candidaturas fueron:
Por el Grupo de Madrid: Cuenca.
Por el Grupo de Logroño: Logroño.
Se acordó que en Murcia se optaría por una de ellas.

b) Fue presentáda la dimisión del Redactor, sr. Carlos Moya, a causa de sus ocupaciones laborales. La junta aceptó su dimisión y propuso la elección de un nuevo redactor. Al no presentarse ninguna propuesta, la Junta de HEJS aceptó encargarse de editar el próximo boletín.

c) Quisieramos recordar que en el Congreso de Murcia habrá la reunión juvenil y diversas actividades, Durante este Congreso se insistirá en la elección de un nuevo redactor.

d) Finalmente fue propuesto la reorganización de la red de delegados de HEJS, en todos los grupos esperantistas.

El Secretario
Salvador Guillermo.

++++++++++++++++++++++++

=PERPINYA=
VENU!!

al la jarrekontiĝo de J.E.F.O. 5,6,7,8 ajn de junio 1981-a.
Sude de la franca ŝtato, norde katalunlandaro, dum varma pentekosto, ni invitas vin al plonĝo en junularan internacian etoson!!

¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡¡

## LA KANTABROJ

Ni ĉiuj aŭdis aŭ legis ion pri la antikva Kantabrio, kiu senmortiĝis pro la heroa rezistado de siaj loĝantoj kontraŭ la Romana subpremado. Sed la celo de ĉi tiu artikolo ne estas rakonti tiun longan kaj kruelan militon, kiu daŭris dek jarojn kaj per kiu finiĝis la Romana konkero de Hispanio. Mi nun deziras priskribi iliajn kutimojn kaj vivmanierojn, kaj precipe elstarigi ilian amon al la libereco kaj sendependeco, kiel povis plurfoje konstati la Romanoj dum la Kantabraj Militoj.

++++++++++++++++

La kantabroj okupis la teritorion, kiu ampleksas la hodiaŭan provincon de Santander, la orientan parton de Asturias, kaj la nordon de Burgos kaj Palencia. Ili, kune kun la aliaj popoloj de la nordo de Hispanio, estis la plej sovaĝa tribo el la duoninsulo. La kaŭzo de ĉi tiu sovaĝa stato estis ilia lando, malriĉa kaj fora. La nordajn montojn ne atingis la orienta influo, kiu estis tiel granda ĉe la maditeranea marbordo. La lando apenaŭ produktis manĝaĵojn. Ili vivis el la malmulta tritiko, kiu kreskis sur la ebenejoj, kaj el glanoj, el kiuj ili faris panon. Ili manĝis kapran, ŝafan kaj porkan viandon; kaj trinkis akvon, bieron faritan el tritiko aŭ hordeo, kaj kelkefoje vinon, kiam ili akiris ĝin per komerco. Unu el la kantabraj triboj havis ĉevalsangon kiel preferatan trinkaĵon. La glasoj estis lignaj, ĉar ligno estas abunda, dum ceramiko malabundis. Oni ankaŭ atribuis al ili la strangan kutimon lavi sin kaj purigi siajn dentojn, tiom viroj kiom virinoj, per urino purita en potoj.

Iliaj kabanoj estis ŝtonaj aŭ krude faritaj el branĉoj kaj pajlo. Ili loĝis en malgrandan vilaĝetoj sur la montoj, kaj kelkefoje en relative grandaj urboj, ĉirkaŭataj de remparoj.

Ili portis lanan aŭ linan tunikon, kun zono. Ili ankaŭ uzis mantelon, faritan al la nigra lano de siaj ŝafoj, kiu taŭgis por varmigi ilin kiam ili dormis, sur benko aŭ sur la planko. La kantabroj portis ankaŭ pantalonon kaj botojn, ĉar la klimato en tiu regiono estas tre malmilda.

Estante tiel malriĉaj, ili devis fari raziojn en la apudaj ebenejoj, kaj ĉi tiu estis unu el la kauzoj, pro kiuj la Romanoj deklaris al ili militon.

Ĉevaloj kaj malliberuloj estis oferataj al militadio. Dum plenlunaj noktoj ili festis kaj adoris lunan dion. La kulto al la naturaj dioj, fontoj kaj sanktegaj lagoj estis por ili plej grava.

Preskaŭ ĉiuj loĝantoj de tiu ĉi parto de Hispanio uzadis, antaŭ la regnado de Tiberio, etan rondan ŝildon, kaj malpezajn armilojn kiel ĵetlancon, ŝtonĵetilon kaj glavon, "por esti pli facilmovaj en kuradoj kaj racioj"-diras Strabono, fama helena geografo-. Krom infanterio, batalis ankaŭ kelkaj kavalerianoj, kies ĉevaloj estis instruitaj grimpi sur montoj kaj fleksi siajn genuojn se la neceso ĝin postulis. Estis kutimo, mortigi sin kiam la ĉefo mortis en batalo.

Estis proverba ĉe la antikvuloj la krueleco de tiu ĉi popolo; ilia ega kuraĝeco en la batalo kaj ilia amo al la sendependeco kaŭzis la miron de Romo. "La iberoj-diras Strabomo-egalas je la forto al la plej kruelaj bestoj; ilia furio kaj krueleco estas blindaj. Dum la kontraŭromana milito oni povis vidi teruregajn scenojn: patrinoj mortigis siajn gefiloj antaŭ ol la malamikoj ilin kapturos; iu filo, laŭ la ordono de sia patro, prenis lian glavon kaj mortigis siajn gepatrojn kaj gefratojn, kiuj troviĝis enkatenigitaj; virino mortigis ĉiujn, kiuj estis malliberigitaj kune kun si; viro sin ĵetis en la fajron antaŭ ol doni sin al la deziroj de kelkaj soldatoj, kiuj ebriiĝis dum festeno... Oni ankaŭ citas la sekvantan trajton de blinda furiozo ĉe la kantabroj: malliberiginte kelkajn el ili, kaj krucuminte ilin, tiuj ĉi sovaĝaj montanoj ne ĉesis kanti batalkanzonojn dum tiel kruelega turmento".

La kantabroj estis precipe kruda kaj forta raso, -miksaĵo de keltoj kaj iberoj-kiu toleris kun la sama senpasio varmon, malvarmon kaj malsaton, kaj kiam ili atingis la agon, kiam homo estas jam sen energia, ili malŝatis maljunecon ĝis la ekstremaĵo, ke ili ĵetis sin en abismon. Preskaŭ ĉiuj kantabraj malliberuloj, kaptitaj en la batalo, mortigis sin mem.

Ankaŭ la virina konduto surprizis la Romanojn: estis ili, kiuj kulturis la kampojn; kiam venis la tempo por akuŝi, ili ĉesis labori, naskiĝis infaneto, ŝi lavis lin ĉe la bordo de rivereto kaj denove iris al la laboro.
Oni citas ankaŭ kiel unu el la kantabraj kutimoj, ke ili sin provizis per veneno, ĉerpita el herbo simila al petroselo(sendube cikuto), kiu mortigas sendolorige:ili ĉiam portis tiun venenon kun si por uzi ĝin kiam la okazo, laŭ iliaj principoj, tion postulis.

+++++++++++++++

Ana Maria Ranero Antolín.

+++++++++++++++



KURSO DE ESPERANTO FARITA DE LA SAMIDEANO EL MADRIDO J.CARLOS OKAZE LA 5-a HEJSTENDARO EN ELCHE.

## HO, KIOM MALMODERNA HOMO NI ESTAS

Okazis la festoj de la urbeto kaj multe oni komentariis pro la okazanta kermeso. Tiom granda kaj allonga estis la informado de tiu amuza vespero, ke ni kaj mia ĉarma edzineto decidis ĝin ĉeesti, almenaŭ por vidi - kio okazos - tie. Mi devas mencii, ke tiun kermeson oni anoncis senpaga, kio multe influis en nia decido.
Tuj mia edzino kaj mi konstatis, ke estas tre opportuna momento por reakiri aŭ almenaŭ ĝui parton de la pagitaj impostoj. Evidente, la plej alloga ero de la kermeso estis la balo muzikata de renoma orkestro. Je la lasta momento aliĝis al ni, nia okjara filo.
Nu, kiom fari?.
Laŭ nia hejma kutimo, ni alvenis al la kermeso malfrue. La festo jam estis komenciĝinta kaj la homaoj, junaj kaj ne junaj amuziĝis bonege. Mi kaj mia edzino ne alkutimiĝintaj al la novaj kaj modernaj muzikoritmo atentege rigardis ĉion. La orkestranoj meze de multaj modernaj instrumentoj, ŝajnes enĉenitaj maliberuloj, tamen tio ne malhelpis por ke ili faru grandiozan bruon. Kurioze ni konstatis, ke ju pli forta estis la bruo des pli rapide moviĝis la dancantoj.
Interesa estis -muziko- bruo- dancantoj. Eble la genio Einstein, povus lerni iom pli pri la relati veco en tiu dancado.
Mi devas konfesi, ke mia edzino kaj mi iris tien por rigardi, ne por danci. Sed subite tiuj muzikisroj ludis la faman hispanan muzikon -.duoblan paŝon-. Edzineto mi diris, ĉu ni dancu?. Ŝi protestis, kaj prave ŝi protestis, ĉar konfidence mi sciigas vin, ke ŝi dancas "kiel arbo". Tamen, jen ni, en la centro dela homa amaso. Pro nia nesperteco ni estis puŝataj de unu loko al alia, dum tiu vola-ne-vola translokiĝo ni devia atenti pri nia filo, do nia dancado multe komplikiĝis. Finiĝis la folklora hispana muziko kaj komenciĝis alia bone konata de ni, la fama tango, kaj jen ni denove reakirante parton de nia pagitaj impostoj. Iuj moderna longharaj junuloj

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

protestis pro tiom da - maprapida muziko - laŭ ilia esprimo. La rezulto estis ke la muzikritmo ŝanĝiĝis. Verŝajne oni ludis "Skaraban" muzikon. Fariĝis cirkloj de gejunuloj, kiuj moviĝis laŭ propa iniciato: dum unu movis siajn krurojn, la alia movis la brakojn, alai turnis siajn kapojn, kiel dancantaj negroj el Afriko.
Antaŭ, kiam mi iris al la dancejo, mi ja ĉirkaŭbrakis mian kundancantinon, kiel eble plej forte kaj amene. Nun ne, junulo dancas tien kaj junulino du metrojn malproksime, ĉiu atentas pri si mem, ĉar tiom frenezigas ilin la muziko, ke apudulo ne multe signifas, Ankoraŭ pli strange, se en la cirklo troviĝas nur junuloj aŭ inverse junulinoj, tio por ili ne gravas. Ĉiu enfermiĝas en si mem, ĉiu ekscitiĝas per si mem. Mia edzino kaj ki ne komprenis tion, sedsamtempe ni konsideris nin malmoderanaj, rilate al tiu dancado.
Mia edzino kaj mi, progresemaj homoj de la piedoj ĝis la kapo decidis preni parton en tiu dancado de -skaraba- aŭ simila muziko. Ni aliĝis al gejunula dancanta rondo. Mi intencis iom kopii, lerni de miajn kundancantoj, sed sajnas al mi, ke mi tute fiaskis. Mi deziris uzi harmonie miajn korpajn movojn, laŭ la ludata muziko, imitante miajn geapudolojn, sed vane, kiam mi levis la brakojn, la piedoj ne moviĝis, kiam mi intencis salteti per unu piedo, mi ne povis turni la kapon kaj ĝin utiligi por regi nin, do nia "inteligenta" kapo servis nenion al mi. Mi ventro protestadis kiam mi puŝadis ĝin antaŭe aŭ malantaŭe, miaj postaĵoj kaj la "malaj" partoj ŝajnis mortaj. Kia katastrofo patrino mia, kia honto !!. Pri mia edzino, permesu ke mi rakontu nenion, ŝi ŝajnis arbtrunko sur akvo, kiu moviĝis sen propa iniciato. Sed la vera fiasko venis, kiam mi turniĝis kaj, kio okazis?, mi ne scias, sed mi troviĝis en alia
dancanta rondo konsistanta nur la viroj. Ho!, ke neniu vidu min, mi pensis. Mi dancante nur kun viroj. Io terura kaj hontinda!!. Kaj mia edzino, kie ŝi estas?, ŝi malpaeris. Kie estas mia filo?, Kia situacio!!.

Fine ĉesis la muziko kaj eĉ iuj junulo adiaŭis min, kvankam mi ne estas tute certa, ĉu ĉiuj estis junulo aŭ troviĝas inter ili iu junulino. Komprenebla mia tuja reago estis serĉi mian edzinon kaj nian filon. Ĉi lastan mi tuj trovis. Li diris al mi, ke lia patrino troviĝas je la alia fkamko de la dancejo, kaj li daŭrigis dirante, ke iu sinjoro prenis la manon de la patrino kaj kunportis ŝien tien. Klarigo ne trank viliga por mi. Ĉi aranĝiĝis bone, mia edzino tuj revenis al la priparolita rendevuejo, ŝi klarigis sian forlasgon de la dacanta grupo en kiu ni ambaŭ troviĝis. Junulo konata de ŝi, diris al ŝi, venu al nia rondo kaj instruos vin danci. Mi rakontis al ŝi mian aventureton kaj ni ambaŭ ridis, sed ne ridis mia filo, kiu admonis nin, ĉar ni lasis lin sola. Interne ni estis kontentaj, ni iomete mocerniĝis. Do, feliĉaj ni revenis hejmen.

ALDONA KONSILO: Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne iniciatiĝis en la moderna dancado, jen konsilo, kiu donis al mi akimo mia: Butonumu bone la manikojn kaj kolumon de via ĉemizo, alĝustigu bone la malsupran parton de via pantalono kaj ne forgesu fermi bonege vian pantalonon aperturon, poste vi enmetu inter via korpo kaj la internaj vestaĵoj kvardek aŭ kvindek pusojn. Mia amiko asertas, ke tuj oni komencas movi ĉiujn membrojn de la korpo. Poste vi nur devas adapti tiujn movojn al la moderna muziko.

LUIS SERRANO PEREZ

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## 23-a KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

26-27 septembro 1981

MOIA (BARCELONA)

21-a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ en ESPERANTO

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## CUMBRE DE JOVENES ESPERANTISTAS EN ELCHE.

El objetivo de este campamento(Quinto que se celebra en España) es el de propiciar que los jóvenes esperantistas tengan un contacto, al mismo tiempo que se reunirá la directiva y se estudiará el relanzamiento de la Revista "Juneco"("Juventud") Por otra parte según nos exponen tres miembros del Grupó de Elche, Clemente,Antonio Verdú y Luis Zapata, se visitará la ciudad y se realizaran practicas de Esperanto.

## QUEREMOS QUE EL ESPERANTO SEA UNA LENGUA OPTATIVA EN LAS ESCUELAS

Sesenta jóvenes esperantistas de toda España celebraron durante el pasado fin de semana una acampada en el Camping Palmeral, organizada por el Grupo de Esperanto de Elche. El objetivo de este encuentró, al que asistieron también esperantistas belgas, fue estudiar la reorganización de la Federación juvenil española de Esperanto y la publicación "Juneco" (" Juventud "); También se aprovechó para visitar la ciudad y realizar prácticas de este idioma.
Al término de la acampada charlamos con los organizadores y parte de los asistentes, quienes señalaron que la llúvia habia representado en ocasiones un problema, pero a pesar de ello se desarrollaron todas las actividades previstas. El Balance de la "Cumbre" esperantistas fue considerado positivo, por cuanto había habido posibilidad de practicar la lemgua e intercambiar experiencias.

-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-

GASPAR M.

Artículos publicados en el periódico "La Verdad" de Elche, el domingo 19 de abril de 1981.

""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""
""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

## 41-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN MURCIO
## 17-22-an julio 1981

VENDREDO 17-an.-Akceptado de la gekongresanoj

SABATO 18-an.-Kunsido de la estrare de HEF

DIMANĈO 19-an.-Inaŭguro de strato "Esperanto"

LUNDO 20-an.-Tuttaga ekskurso

MARDO 21-an.- HEJS-KUNVENO kaj ĝenerala Kunveno de HEF.

MERKREDO 22-an.-Solena fermo de la Kongreso.

++++++++++

HEJS delegitoj kaj anoj, ĉeestu en la HISPANA KONGRESO por defendi viajn ideojn kaj dezirojn.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## 4-a PRINTEMPA FESTO

Organizata de Centro de Esperanto Sabadell kaj HEJS-RESTADEJO, okazis en Monistrol de Montserrat la 4-a Printempa Festo la pasintan 17-an de Majo.

Dum la festo disdonis inter la publiko-neesperantista-200 foliojn pri Meksikio kaj 500 foliojn pri la vortaro "lexicon sopena"-

Plie 140 infanoj partoprenis en la konkuro pri pentrado.

Danke al la financa helpo de diversaj Bankoj oni donis al la gajnintoj de la diversaj konkuroj pli da 30 kasetoj kaj libroj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

37-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO en OAXTEPEC-MEKSIKIO 1o-a ĝis 17-a de julio 1981

Petu aliĝilojn al la sidejo de HEJS.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## KOTIZOJ

Ĉiu junulo malpli ol 25-aĝa pagante la kotizon al HEF estas aŭtomate membro ankaŭ de HEJS kaj ricevas la revuojn:"HEJS-JUNECO","KONCIZE"kaj"BOLETIN"

HEJS-membroj..........................................500 Pto.
Revuoj:"HEJS-JUNECO"kaj "KONCIZE" (kune)..........250 "
Revuo:"HEJS-JUNECO" (sola)................................150 "

## ESTRARO

PREZIDANTO

JORDI FERRE I MARTINEZ
Carreras Candi 25 B 1º4ª
Barcelona-28-

VICPREZANTINO

ANA Mª RANERO ANTOLIN
Duques de Nájera,20 8ºA
Logroño.

SEKRETARIO

SALVADOR GUILLERMO I VIÑETA
Escultor Canet 20 1º2ª
Barcelona-28-

VICSEKRETARIO

F.Miguel Muñoz Garre.
Carretera de Beniel, 47
Alquerías(Murcia)

KASISTO

Carlos Aragay Girona
C/Bassegoda,40 3º1a
Barcelona-28-

HEJS reprezentanto en TEJO

CARLOS N. MOYA SEGUI.

## HEJS-DELEGITOJ

ELCHE

ANTONIO VERDU CASELLES
José Bernard Amorós, 38 3º
Elche (Alicante)

LOGROÑO

ANA Mª RANERO ANTOLIN

MADRIDO

MIGUEL ANGEL SANDRO
Marcelo Viera, 163.
Madrido-26-

MALAGA

FELIPE ALBERT REYNA
Bda. La Paz Bloque 2
C/Bethoven,6-1ºF
Málaga-4-

MURCIA

F.MIGUEL MUÑOZ GARRE

VALENCIO

CARLOS N.MOYA,SEGUI
Avda. del Cid, 106 Esc. 1-7ª
Valencia -18-